# Informilo de SES　（SES 通信＃219）'22 / 2 / 1

## Saluton, SESanoj!

Esperanto kaj mi

En la jaro 1965 UK okazis en Tokio, kiel la unua kongreso en Azio.　Sed mi ne kuraĝis partopreni en ĝi, ĉar mi eklernis E~on nur antaŭ duonjaro.　Tamen mi partoprenis en Oomoto-Internacia Festibalo en la urbo Kameoka, en kiu multaj eksterlandaj samideanoj partoprenis.　Do, mi amikiĝis kun ili, precipe kun s-ro Vilkki Joel (el Finnlando) kaj s-rino Alice Kessler (el Svislando).　S-ro Vilkki havis demandon al mi jene.　“S-ino Gotoo, ĉu via prapatro estis rabisto?” Konsternite mi diris, “Ne, kial?” Do, li montris al mi sian vortaron.　Por komencanto estis malfacile klarigi diferencon pri “gootoo kaj gotoo”.　Tamen ni amikiĝis dank' al “gootoo.”　Post 2 jaroj mi estis invitita de li kaj gastiĝis ĉe li eĉ unu semajnon. Kun Alice Kessler mi korespondis post la Festivalo.　Kaj kiam mi partoprenis en la UK en Roterdamo, Alice invitis min en Zuriko, kie mi gastiĝis unu semajnon. Ni iris al monto, kie pasigis ĝojajn tagojn kiel sonĝo. Ŝi akompanis min al Parizo por gvidi min.　Kiam venis adiaŭa tempo, ni ploris.　Poste mi invitis ŝin en Osaka 3 fojoin, kaj unu el ili ni vizitis kune Hokkaidon. Intertempe mi vizitis ŝin denove 2 fojoin.　Ni skribis reciproke tiel kiel “Mia kara fratino!”　　Sunjo

**＃例会の休会について：少なくとも２月一杯は休会にします。**再開時は連絡します。１月 15 日には少人数で集まりましたが、あまりに感染者が増えている状況なので、その後休んでいました。３回目のワクチンで早く収ることを期待するしかないようです。